

La Suda Kruco

Oficiala Orĝano de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencej.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 125 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Novembro 1930.

NOTE ON THE GLORY OF WAR

(and its relation to the Interlanguage problem).

In "The Age" of 23rd September the world is told that during the retreat from Mons Sir John French called to see General Lanrezac. "Neither could speak the other's language, and the meeting was a fiasco, for which the armies paid the penalty."

If ever example of the urgent need for an auxiliary world-tongue were sought for surely one would go no further than this.

Two men, each of whom, we may presume, was for years the recipient of costly scholastic attention, are seen in a moment of sharpest crisis to be utterly impotent to express themselves even in outline one to the other. Need it be again said, that in this age of internationalisation, of crumbling race barriers and shrinking space the call is urgent to provide in the schools of the world that mental panoply designed to equip fully the International Man? A neutral auxiliary world-tongue would be the basic element in such an education.

To return to France and Democracy's saviours of 1914. Were the consequences limited to the above farcical contretemps one might be pardoned for chuckling at the blustering embarrassment occasioned the gentlemen concerned; but the significant line that tells how the armies paid for this lack of common language divests the scene of humor and makes the thoughtful sigh as they ponder History's bitter truth that our poor blundering humanity perceives the successive footholds in its travail up the Mount of Destiny only slowly, hesitatingly, and with anguished eyes blinded with blood.

[The lingual disharmony in the Allied armies, drawn from the four quarters of the earth, contrasted sharply with the unity reigning in the troops under the German High Command, who used one language from Ostend to Caporetto, from Riga to the Bukowina. This was an advantage, the strength of which has not yet been adequately recognised by students of the titanic struggle.

Is it not true to say that in some respects the central African savages occupy a higher level than we? Through the Dark Continent run certain widely-used regional languages that enable the tribes to surmount their difficulties of dialect and to carry on their simple business. Benguela, the language used by the different peoples of the Congo, Urdu or Hindustani, the master-language that carries one through a hundred dialect-territories, Mandarin Chinese, and Chinook, the Esperanto of the American Indians, are all standing reproaches to Babel-scoured Europe.—Ed.]

RADIO.

Grava anonco!

After much effort on the part of a few of the Melbourne Esp-ists arrangements have been made with the amateur radio transmitters to help in propagating *via kara lingvo*.

We now require the help of all samideanoj in Australia. We want you to listen in to the transmissions and send your reports to the stations concerned. The more reports received the better will be our chance of retaining the interest of the amateur transmitters. We have started the ball rolling, now it is up to you to keep it going.

Sam-o C. A. Hughes havas la send-stacion V.K.3.C.A. kaj elsendas jen-

tempe:—Lundo, merkredo, jaŭdo, 17-30 ĝis 18a horo, dimanĉo 9a ĝis 10a, 17a ĝis 18a horo. Ondlongo estas 80 metroj.

By the time of going to press it is expected that several stations on 2.0 metres will be transmitting Esperanto. Listen in to the amateurs every Sunday. For further information send stamped envelope to P. Holmes, Sekretario Int. Radio Asocio., Box 731F, P.O., Eliz.-st., Melbourne.

N.Z.E.A. SECTION.

4th Official Bulletin.

Since the 3rd Official Bulletin was forwarded to members, the New Zealand Esperanto Association has suffered the regrettable loss (as already reported in these columns) of two of its highly esteemed patrons—Sir Joseph Ward and Sir Robert Stout. The loss was the more severe in that the deaths of these distinguished gentlemen occurred within the short period of eleven days. Condolences of the NZEA membership were conveyed to the bereaved relatives; and while the body of Sir Joseph Ward lay in state at Parliament House, a beautiful wreath was placed on the casket as an expression of the membership's sympathy. Sir Robert's funeral was private, without flowers, by request.

Membership Strength.

At 25th September the NZEA membership numbered 177, including 28 new members for the year. Four members with commendable fidelity paid their subscriptions for the forthcoming (1931-32) year in advance; but approximately 60 have yet to give attention to the matter of renewing their subscriptions (2/6) for the current year. The Executive is hopeful of concluding this year with a numerical increase; and, as most of the clubs have reported an increased number of students, this should be quite practicable. Eight NZEA members are known to have travelled overseas: Mrs. and Miss MacQuarrie, Mr. Gibbs to Britain, Messrs. P. Dean and J. Majstrovich to Yugoslavia, Mr. R. A. Lochore to Germany, Miss Weaver to Samoa, and Mr. C. McDonald, now employed as an engineer on an overseas steamer. Esperanto in practice?

The following donations to the NZEA funds have been received since 1st May, and are acknowledged with thanks:—Mr. R. A. Wright, M.P., 2/6; Miss L. Corkhill, 6d; Mr. P. Sunde, 8/-; Mr. J. Keay, 2/6; and Mrs. K. W.

Lovell-Smith, 17/6. Total, £1/11/-.

In addition, Mrs. Lovell-Smith has generously guaranteed the NZEA an annual donation of 10/-.

Propaganda Activities.

In July last the NZEA Executive rightly approved the proposal to circulate in the interests of Esperanto the editors of all New Zealand newspapers. A copy of the propaganda leaflet specially compiled by the NZEA for use in the Dominion was accordingly mailed under cover of a suitable explanatory memorandum, at a cost not exceeding £1/10/-, to 250 editors; and excerpts submitted to the NZEA from various parts of the Dominion indicate that this effort, the result of which indeed may be far-reaching, was not in vain. Our faith in this is strengthened by the fact that new NZEA members came forward, and several enquiries for textbooks were received. The Association also supplied letters to the correspondence columns of the Wellington daily papers, which circulate freely through the governmental departments, on the subjects "Madrid Urological Conference," "Learning and Languages," "Talkie Troubles," and "N.Z. Trade Missions Abroad." Each letter stressed the advantages of utilising Esperanto in each separate field.

International Co-operation.

In accordance with the decision made at the meeting of U.E.A. delegates at the First N.Z. Esperanto Congress held at Wellington in January last, the NZEA opened a contribution list to raise funds to assist in removing the deficit of the Universal Esperanto Congress held at Vienna, and the sum of £4/3/-, comprising the following amounts contributed by New Zealand club members and isolated Esperantists, was collected: Wellington Club, 14/6; Christchurch Club, 5/-; Masterton Club, £1/1/-; Auckland Club, 5/-; Mr. S. Andrew, 10/-; Mr. J. McGuigan, 2/6; Mr. W. McGuigan, 2/6; Mr. O. Babich, 2/6; Sennomulo, £1. After meeting incidental expenses of 4/-, the NZEA remitted the sum of £3/19/- to the fund organiser, Mr. P. Blaise, London. Cordial thanks are expressed to all who contributed to New Zealand's portion in the effort to wipe off the only debt existing in the Esperanto movement.

In May the General Secretary of the International Central Committee, Geneva, wrote requesting a supply of the NZEA propaganda leaflets, stating the

flets would assist his Committee in its publicity work. In forwarding the desired supply the NZEA appreciated the high tribute paid its propaganda activities by the acknowledged "hub" of the Esperanto movement.

An international petition—copy of which had been sent from Geneva to the Dominion's Postmaster-General—urging all postal administrations to consider the utility of Esperanto, forwarded by the International League of Esperantist Post and Telegraph Officers (ILEPTO), was translated for and duly appeared in "The Katipo," the official organ of the New Zealand Post and Telegraph Officers' Association, comprising over 7000 members.

Examinations.

The question of examinations has been receiving serious consideration since the First Congress accepted a resolution authorising the NZEA Executive to investigate the position; and progress was made to a point where a round-table conference was necessary in order to arrange certain details. A meeting was accordingly held at Wellington, on 22nd August, Messrs. W. L. Edmanson, E. C. Jack, L. E. Dust, Bertram Potts, and W. H. King, appointed by the Executive to discuss the position, taking part. A resolution to the NZEA recommending the Association to introduce an oral test in Esperanto was agreed to by three votes to two, the dissentients favouring a written test in conjunction with the proposed oral one. A further meeting was held on 19th September, when suggested empowering rules, together with a proposed scope of the test were framed for submitting to the NZEA Executive and to the Second Congress.

Second New Zealand Congress.

The First Congress resolved that the Second Congress should take place during Easter, 1931, and that Auckland be the venue. Anticipatory to the realising of this resolution, members are reminded that the NZEA rules require three months' notice to be given of intended amendments to rules, of nominations of officers for the ensuring year, and of proposed questions for placing on the agenda paper. Such notice must reach the Honorary Secretary (7 Brook Street, Wellington), not later than 31st December, 1930.

(W.H.K.)

KRONIKO.

Wellington, Nov-Zelando.—Jam de post sia starigo la loka klubo ĉiumarde

funkcias sen interrompo; altkvalitaj programoj enhavas intereson por ĉiu alestanto, ĉu komencula, ĉu sperta. La vigla sekretario, s-ro Bertram Potts, F.B.E.A., ĉiusemajne finigas la laboron per trafa raporto en tagĵurnalo. En kunveno de 7a de oktobro membro s-ro Vernon Lecaldano, en parolado "de Parizo al Vieno," rakontis spertojn el sia vizitiro al Eŭropo, de kie li antaŭnelonge revenis. Li klare montris sur la avantaĝojn uzeblajn en fremdlandoj pere de Esperanto.

Konvinkiga raporto (naŭcola) pri la 22a Kongreso ĉe Oksfordo aperis en ĉi-tiea tagĵurnalo "The Dominion," la 7an de okt-o. Provizita de la NZEA al la redaktoro, la raporto, elĉerpita el "International Language," enhavis resume la ĉeffaktojn pri la granda kunveno de trideknacia samcelanaro; kaj estos mirinde, se iuj, kiuj tralegis la artikolon, ankoraŭ tenos plu dubon pri la ĉiufanka taŭgeco, utilo kaj jam firma establo de nia kara lingvo. Espereble alilokaj samideistoj, kiuj abonas al "I.L.," same faris.

Masterton, N.Z.—Speciala kunveno de la Masterton'a grupo de NZEA okazis je 15a de okt. S-ro B. Johns prezidis antaŭ iom multe de geanoj. De s-ino L. Payne ili ricevis leteron, kiu sciigis pri ties ekŝiĝo el la ofico de hon. sek-iino de la grupo pro malbon-sano. Kun akra bedaŭro la ekŝiĝo estis akceptita, kaj la grupo rezolucie dankis la s-inon pro sindona servado al ĝi de post starigo. Ili enoficigis s-ron H. F. ranks (38 Workop Rd.) kiel sekcion por la jarcetero. Nova membro estis akceptita en la registrolibron—grava afero por nia grupo—kaj s-ino Payne kaj s-ro A. Dewar enskribigis grupdecide kiel dumvivaj membroj.

Loka taggazeto enhavis raporton pri kongresfaroj ĉe Oksfordo, represitan el brita ĵurnalo "Perthshire Advertiser." Aperis la 7an de okt. en la "Wairarapa Daily News" longa artikolo eduka, "Esp. kiel krom-okupo," verlitita de grupinstruisto s-ro Dewar.

Melbourne, Vict.—Je la Societa kunveno, la 23an de Sept., s-ro Ballard parolis pri la Usona verkisto, Washington Irving, kiu naskiĝis en Nov-Jorko en la jaro 1783, kaj kiu nomigis la "patro de l' literaturo" en Usono. En sia parolado s-ro Ballard diris, ke en juneco la verkisto estis iom maldifligenta, eble pro nebona sano. Li vizitis Eŭropon, kaj post dujara restado tie, revenis al Nov-Jorko kaj verkis kun

sia pli juna frato, ĵurnalon "Salmagundi." Lia unua libro eldoniĝis en 1809. Dum kelkaj jaroj li laboradis kun siaj fratoj kaj pro negocaj aferoj vizitis Angluĵon, sed la firmo poste bankrotis kaj Irving turnis sian atenton al literaturo. "La Skizlibro" aperis en 1819, kaj poste aliaj libroj. Dum kelka tempo li loĝis en Hispanujo, kaj reveninte Usonon, kie oni akklamis lin geniulo, li acetis bienon apud la bordoj de l' rivero Hudson. En la jaro 1855 aperis lia lasta verko la "Vivo de Georgo Washington." En 1859, Washington Irving mortis.

Je la 30a de Sept, f-ino Irwin kaj s-roj Ballard, Skurrie, kaj Holmes legis triaktan komedion, per kiu la vespero pasis tre feliĉe.

Vizitis la Melb. Societon la du mond-vagantoj, s-roj Kotulsky kaj Masluk el Latvio, kaj okazis tre amika interbabilado. La anoj enskribis la nomojn en ilian aŭtografilibron, kaj aĉetis kelkajn el la fotografaĵoj.

ESPERANTO EN LERNEJOJ.

Grava Alvoko.

Por la statistiko, kiun ni faras por International Auxiliary Language Association in the United States, Inc., New York, rilate la temon "Esperanto en lernejoj," ni nepre bezonas ankoraŭ materialon. Estas necese, konстати, en kiuj lernejoj de la mondo dum la lasta kvaronjaro de 1930 Esperanto estas instruata.

Ni kore petas, ke ĉiuj gekolegoj, kiuj dum ĉi tiu tempo instruas Esperanton en siaj lernejoj, sciigu nin pri tio. Ili estas petataj:

- 1.) doni sciigojn pri la koncerna lernejo, sciigante ĝian nomon en sia nacia lingvo (per latinaj literoj) kaj samtempe doni la nomon kaj la gradon en Esperanto,
- 2.) doni sian precizan propran adreson kaj
- 3.) aldoni notojn, kiuj ŝajnas necesaj por klarigi la situacion.

Estas tre grave, ke ni povu liveri kiel eble plej kompletan materialon, grave por nia kunlaborado kun IALA kaj same grave por nia Esperanto-propagando.

La rezulton ni transdonos al nia Esperanto-gazetaro.

"Kunlaborado de IALA en New York kaj de la Instituto J. J. Rousseau en Geneve kun la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig."

D.ro Dietterle.

N.B.—Bonvolu sendi la materialon al

la sekretario de "Kunlaborado" f-ino Martha Moelke, Brandenburgische Str., 5, 1, Berlin-Sudende (Germanujo) -plej malfrue ĝis fino de l' jaro 1930.

TO THOSE WHO SUPPORT

We give thanks for the following. It is hoped that the briefness of the list may impress its full significance on those many who are still withholding from us strength that they should give. The sum does not even cover a quarter of the cost of this month's issue.

Melb. Esp. Soc. (anonco) 5/6 aŭg. '31; s-ro T. Polich 4/- aŭg. '31; s-ro N. Mills 4/6 julio '31; vendo al f-ino Sinotte 6/-; Total 20/-.

ZAMENHOF STREET!

(see last issue)

Our Polish friends have gained at last a well deserved victory, in that the town council of Warsaw, after consideration of their petition, signed by 23,522 adult citizens of Warsaw, has decided to change the name of Dzika-Street to that of Zamenhof. We regret that the matter was somewhat wrongly reported on page 217, as for many years the Bialystok street in which Zamenhof was born has taken his name. Ulica Dzika is situated in the Jewish quarter of Poland's capital. There Zamenhof lived from 1898. We heartily congratulate all those who so patiently organised for this happy result.

ESPERANTO LITERATURE

A Pithy Presentation.

A young English bibliophile, writer of reviews and articles, on the staff of "International Language," one K. R. C. Sturmer, has by his booklet provided a ready means whereby much learned ignorance may be dispelled.

Strange it is that so many people otherwise well-informed are yet unaware that "Hamlet" has for years been translated into Esperanto. Mr. Sturmer, with keen literary sensitivity expressing itself in well-chosen phraseology, here sets out to enlighten such enshadowed mentality by a most interestingly compiled survey of the most noteworthy Esperanto works from 1887 to 1930.

Mr. L. N. Newell contributes an article on "A New Poetry," which reveals keen discernment in appraising the work of those French, Russian, German, Polish, Czech and Hungarian writers who, in a so-called artificial

tongue, outbreathed the many-mooded movements of their spirits, or transferred the rich coloring of the "Chanson de Rolande" and "Pan Tadeus" from their native gardens to another. The work of Kalocsay, says Newell, is characterised by a technical skill greater even than Baghy's, and certain of his work has no need to fear comparison with anything in the national literatures.

Only the brevity and incompleteness of the booklet will engender in the reader a sense of disappointment. One must, however, regard it as a first attempt to present in English some idea of the 40 years' literary output of Esperanto, as an introductory sketch to the board-bound volume of to-morrow, which will be either a sequenced and complete treatment of the unfolding of our literature through the years, or an embracive symposium, covering all the departments, philosophy, science, religion, belles-lettres, each chapter of which will be written by a recognised authority. Price, 8d. at B.E.A.

(Robo)

KURSO PER TRADUKADO
(kondukata de s-ro G. Gordon,
F.B.E.A., sekretariino, f-ino B. Blyth,
10 Victoria-av., Surrey Hills,
Melbourne, E.10.)
NIGRA JAŬDO
(finita)

Rolf Boldrewood eraris nomante (7) ŝafisto (1) la patron de la viktimoj ĉe la rivereto Upper Plenty. Li estis George McLelland (pron. ĝorĝ makle-land) prosperanta, diligenta bienhavan- to (2). Li kaj liaj (3) edzino kaj kvin infanoj estis en la kabano. Sin- jorino McLelland rigardis eksteren tra la pordejo, sentis la varmego de la proksimiĝanta brulo, kaj post unu minu- to la kabano estis en flamoj. Sinjoro McLelland, terurita, fortege penis savi la (4) familion. La plej juna, okjara filo mortis en liaj brakoj dum li kuregis tra la flamoj al la rivereto. La edzino kaj la aliaj kvar infanoj pereis en la brulego kelke (5) da metroj for de la kabano, kaj la preskaŭ frenezigiĝinta McLelland apenaŭ (6) savis al si la vivon rifuĝante (7) en la rivereto.

En la sama distrikto alia homo tiel grave brulvundiĝis, ke post unu sem- ajno li mortis en la hospitalo en Melbourne.

Ĉe Barrabool (pron. barabul) pereis ankoraŭ unu (13) viro. Tiel la sumo de mortoj de homoj estis ok.

Grandega estis la nombro de mort- perditaj brutoj (8). Unu vidinto pris-

kribis la teruran scenon de kadavroj de ŝafoj kaj bovoj, amasiĝintaj en fluejoj de riveretoj, kune kun aliaj brutoj duone mortintaj kaj suferantaj teruran doloron. Apud Westernport la edzino de bienhavanto havis spiritpre- tecon por malfermi la stalpordojn, por ke la ĉevaloj sin forsavu, tamen la brutoj estis tiel teruritaj, ke ili kure reeniris la stalojn kaj mortbruliĝis.

En Gippsland la fumo estis tiel densa, ke la tago estis tiel malluma kiel nokto, kaj unu homo senseligante (7) sian ĉevalon ne povis vidi la bruton. La mallumo daŭris tutan tagon kaj akom- panis ĝin krakbruegoj de tondro. La varmego ĉi tie, kiel ĉie, estis intensa. Boldrewood diras, ke ĝi atingis cent tridek gradojn laŭ la Fahrenheita skalo (55 laŭ la Centigrada) sub la suno. Termometro ĉe strato Collins en Mel- bourne registris cent dek sep gradojn Fahr. (47 Cent.) en la ombro kaj cent dudek naŭ gradojn Fahr. (54 Cent.) sub la suno. Aferoj en la Alta Juĝis- tarejo en Melbourne ĉesigis je tagmezo. La kurado de la brulego haltis nur tiam, kiam ŝanĝiĝis direkto de la vento. La sekvantan tagon (9) pluvo falis en iuj distriktoj.

En tiu tempo ekzistis nek telegrafo nek kamparaj (10) fajrobrigadoj nek rimedoj por rapide transporti homojn por batali kontraŭ brulego, tamen en ĉiu okazo (11) ili nur nemulte helpus kontraŭ la furioza kurado de kampara (10) brulego. Tion instruis la brulego ĉe Noojee (pron. nuĝi) antaŭ du jaroj.

Estas dirite (12), ke la kaŭzo de la brulego en "Nigra Jaŭdo" estis tio, ke apud Diamond Creek (pron. dajmond krik) du kondukistoj de bovoj forir- ante (7) de sia haltejo lasis bivakan fajron subbruladi. Tiun teruran lecio- non oni ankoraŭ ne lernis.

(Fino)

NOTARO 12.

1. Predikata substantivo. Cox 109.—2. Oni devas traduki vorton laŭ ĝia signifo en la teksto. Ĉi tie la aŭtoro skribante "settler" volas komprenigi, ke la homo ne estis "hired man" sed "landowner." —3. "liaj" ne "siaj." Cox 135. Se oni skribus "kun" anstataŭ "kaj", tiam "siaj" estus ĝusta.—4. "la" anstataŭ poseda pronomo. Cox 100.—5. "kelke da." Notaro 11/2.—6. "apenaŭ" aŭ "preskaŭ ne".—7. Adverba participo. Cox 211.—8. "brutoj" t.e. kvarpiedaj hejmaj paŝtobestoj (bovoj, ĉevaloj, ŝafoj, porkoj, ktp.)—9. aŭ "en la sekvanta tago." Cox 68b.—10. "bush" en Aŭstralio ne ĉiam signifas "arbar-

ego" sed laŭ la kunteksto povas esti "kamparo" aŭ "vasta, sovaĝa (aŭ nekulturata) regiono.—11. "en ĉiu okazo," in any case. Kp. Rab. 24/8—12. "Estas dirite" (Cox 210b) aŭ "iuj diras."—13. "ankoraŭ unu." Notaro 9/6.

YOUR SUBSCRIPTION?

Having ever in mind the necessity for economic administration of The Suda Kruco, the Redakcio earnestly asks readers to kindly cooperate with it by renewing subscriptions in the month in which they fall due. Such a practice would obviate the sending of reminder slips, which at the present high postal rate represents no small charge on production.

There is another matter which we trust will come under the eyes of those concerned. There are several lapsed subscribers to whom the "Suda Kruco" has been sent regularly, **with no acknowledgment**, since 1928, in some cases since 1927. The Redakcio, not wishing to deprive these good people of any service the paper could render them, has kept their names on its books in the hope that such a course would prompt eventually some encouraging response from them. These lines are penned with the object of bringing them to a sense of their moral obligation at least of informing us of their position relative to the paper.

'LOK- KAJ URBNOMOJ DE NOV-ZELANDO.

Kredeble estas, ke iuj samideanoj ekster Nov-Zelando foje sentas sciolon pri la strangaj eĉ teruraspекtaj lok- kaj urbnomoj nov-zelandaj, ekvidante tiujn, ĉu gazete, ĉu poŝt-stampe.

La indiĝenoj de Nov-Zelando, la Maorioj, donis nomojn al multaj lokoj, kaj dum la jaroj ĝis hodiaŭ la nomoj daŭris, kaj ŝajne estas akceptitaj nun jam por ĉiam. Krom la indiĝenoj, la unuaj maresploristoj kaj (dum la antaŭa jarcento) pioniraj koloniistoj respondecis pri granda nombro de la nomoj komune uzataj en la lando.

Esplorvojaĝante ĉirkaŭ la nov-zelan-

daj marbordo en la 18a jarcento, kapitano Cook (elp.: kuk) donis nomojn al lokoj laŭ la cirkonstanco en kiu li alvenis ilin. Li nomis Hick's Bay (gol-feto de Hick) honore al unu el siaj leŭtenantoj, Hick, kiu kiel la unua ekvidis la lokon; Kabo Farewell (kabo adiaŭ) ĉar ĝi estis la lasta loko de Cook vidita antaŭ ol li ekreturnis Anglujen, okaze de sia unua vizito al Nov-Zelando; Bay of Plenty (gol-feto de abundo), ĉar tie li ricevis sufiĉege da manĝaĵo de la Maorioj; Kabo Runaway (kabo forkuro), ĉar tie la Maorioj forkuris, kiam Cook surbordiĝis; kaj Kabo Kidnappers (Kabo de Homŝtelistoj), pro tio, ke grupo de indiĝenoj penis forŝteli nigrulan knabon for de la ŝipo de Cook. La fama landeltrovinto neniam donis al loko la nomon de sia naskurbo, sed tion faris plipostaj koloniistoj.

Fruaj alvenintoj diverskiale provizis multajn nomojn, plejparte pro deziro porĉiamigi nomojn de admirataj eminentuloj en diversaj kampoj, kaj pro amo al tiu urbo aŭ loko el kiu ili elmigris. La plej grandan nov-zelandan urbon, Auckland, nomis la unua guberniestro, Hobson, memore al lordo Auckland; kaj la ĉefurbo, Wellington, tiel nomiĝis pro honoro al la fama angla militisto, la duko Wellington. Enmigrintoj sub la aŭspicio de la ŝtateklezio de Anglujo entreprenis koloniadon de Christchurch, kaj provizis al la provinco la nomon Canterbury (elp.: kanterberi) respektive al la tiunoma episkopo; stratojn en la urbo oni nomis laŭ tiamaĵ episkopecoj de la Anglikana (ŝtata) eklezio. Ĉe Dunedin simila cirkonstancaro regis: alvenis el Skotlando koloniistoj subaŭspicio de la "libera eklezio de Skotlando," prenantaĵ planojn por urbkonstruo verkitajn en Edinburgh—jen la nomo Dun-Edin. (ĉu homonime "Dun"—"done" (farita). do "planoj faritaj en Edinburgh"? Red.). Multaj lokoj ĉirkaŭ Dunedin nomiĝis laŭ lokonomoj skotlandaj: Stirling, Portobello, Bannockburn kaj Dumbarton estas ekzemploj de la frua skota influo.

Respegulo de la nomoj de eminentuloj vidiĝas ĉe la jenaj: Marlborough (la duko Marlborough); Gisborne

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara sportiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumo

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

ĉiam kolonia sekretario de Granda Britujo); Nelson (admiralo Nelson), kiun lokon la Maorioj nomis Whakatu, signifanta "sendanĝera ankraĵo"; Feilding (kolonelo Feilding-soldato en la maoriaj militetoj); Masterton (s-ro Masters-pionira koloniisto, kiu mortis en 1874); Tasman, Golfeto Tasman (Tasman - maresploristo); Wakefield (kolonelo Wakefield-koloniisto de 1839); Russell (grafo Russell-brita ĉefministro en la tempo, kiam la loko koloniigis); Hamilton (kolonelo Hamilton-soldato en la maoriaj militetoj); kaj Ranfurly, Greytown, Hobsonville, Fitzroy, tiel nomiĝis en honoro kaj admiro al iamaj guberniestroj novzelandaj. Tamen ne en ĉiu okazo estis necesa la nomo de famulo.

La urbo New Plymouth (Nova Plymouth) ricevis nomon laŭ la angla urbo Plymouth; kaj Blenheim, ĉefurbo de provinco Marlborough, tiel nomiĝis laŭ la batalo Blenheim-en kiu la angla Duko de Marlborough partoprenis. Multaj el la anglaspektaj nomoj okulfrape priskribas la lokojn, kiuj portas la nomojn: Half-moon Bay (Duonluna Golfeto), Longbeach (Longa Marbordo), Five Rivers (Kvin Riveroj), Island Bay (Insula Golfeto); aliaj lokoj nomiĝis pro diversaj kialoj, ekz., Miranda, la nomo de ŝipo, kiu portis nombron da koloniistoj al Novzelando; Meeanee, tiel nomita de soldat-koloniistoj post loko en Ĥinuĵo, kie ili servis soldate. Berhampore, Miramar, Bombay, kaj Khandallah estis aliaj ĥinaj nomoj donitaj al Novzelandaj urbetoj kaj lokoj.

Oni povas diri certece, ke plejparte la Novzelandaj lok-kaj urbnomoj konsistas el nomoj de maoria deveno. Tiuj maoriaj nomoj, kiuj al multe da homoj prezentas elparol-malfacilaĵojn kaj sen signifojn, enkondukiĝis aŭ pro ia frapa okazaĵo aŭ por iom priskribi la lokon. Ekzemploj de la unua estas la nomo Whakatane, kiu urbo, tiutempe nur loko, tiel nomiĝis ĉar iutage, kiam pirogo (kanoto) komencis forflusi de la marbordo, maoriino, irante pro religi ĝin, ekkriis, "Kia whakatane ake ahaŭ" (mi staros same kiel viro); kaj Waipiro

Bay (golfeto Waipiro), ĉar tie maristoj al maorioj donis bieron, kiun la indiĝenoj nomis "waipiro" — wai (akvo), piro (forte odora). Te Mata, nune vilaĝo, signifas "loko, kie loĝas maorio kun kuglo"; dum Taringamotu, farmbiena regiono, signifas maorilingve "perdis orelon," Waitakaruru, "strigo falis sur la akvon," kaj Kaitaia, "Mangaĵo detruigis per diluvo," ĉar iufoje la terpomoj de la maorioj estis tiamaniere detruitaj.

Same kiel la fruaj koloniistoj provizis nomojn por priskribi naturan aspekton, aŭ apartan trajton de iu loko, tiel ankaŭ faris la indiĝenoj. La jenaj estas tipaj de nomoj el la tuta lando: Paekakariki, "la hejmo de la verdaj papagoj"; Onekaka, "varmega sablo" (kio troviĝas en la loko); Paengaroa, "longa ebenaĵo"; Akaroa, "longa golfeto"; Wanganui, "granda golfo aŭ haveno"; Otira "el la sunlumo" (valego multe kovrita per montombro); Ararimu, "vojo al la arbo nomita rimu"; Hunua, "kaŝita" aŭ "kaŝanta" (ĉar vilaĝo estis kaŝita malantaŭ monteto); Kaihere, "ĉeriza mangaĵo" (kai) mangaĵo, "here" ĉerizo en la loko estis ĉerizarbaro); kaj Waiwera "varmega akvo" (tie troviĝas bolakvaj fontoj kuracigile uzebaj). Ĉar la maorioj uzis certan lokon, kiel mangdeponejon, ili ĝin nomis Kaiapoi; nune urbo vaste konata tra la mondo pro siaj lanfabrikaĵoj altkvalitaj; kaj ĉar abunde kreskis enlandaj arboj "kawakawa" ĉe ankoraŭ alia loko, la koncerna (kie nun sidas grava urbeto samnoma) ricevis la nomon de sia karakterizanta kreskaĵo. Hukerenui tiel nomiĝis, ĉar maorio, Huke, kutimiĝis aŭdi tie strangan fajfadon de la vento, kaj nur pro fakto, ke troviĝis "malnova indiĝena forno" tie, kie nun staras Paraparaumu (multe vizitata marborda urbeto apud Wellington), tiu stranga nomo vivas tra la jaroj por balbutigi ĉiun, kiu ĝin renkontos por la unua fojo.—(W.H.K.).

LA MORTADO.

Disertacio de fakulo.

En 1900 ĉe Vieno prof-o d-ro Herman Nothnagel donis publikan paroladon pri la kaŭzo kaj naturo de la

PERCY HOLMES

ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefona: JW 4017.

mortado. Ĉi tiu traduko sciigas al la Esp-istaro, ke la nomita homo estis kaj altpensulo kaj bril-lingva oratoro. "Nur bona homo povas esti bona kuracisto."

Opiniante la Esp. verkaron ankoraŭ nerieca el popular-sciencia vidpunkto, la Viena E. Societo "Progreso" eldonis tiun ĉi juvelon de la germana sciencia literaturo, per tio ja donante al la mondo frape interesan pritrakton pri tiu universala fenomeno, pri kiu diris Schiller, "Tio (la morto), kio estas absolute universala, devas esti nepre bonfara."

La doktoro asertas, ke vere natura morto, tio estas, morto de homo defalanta de la Viv-arbo, kiel flave velkinta folio, pro nur multaĝo kaj sen ia patologia anomalia, estas treege malofita. Ankaŭ, ke "la Naturo estas tre multe pli kompata ol la homo—se ĝi sole kaj ĉiam povus efikadi, kaj se la homaro alvenus ĝis la natura fino de la vivo, vere, oni povus pri la mortado pensi tiel, kiel laculo sopiras la dormon.....ne fizike turmenta estas la mortado—turmenta estas la anima mortangoro."

Strange estas la interstreketigado ĉe simplaj negativ-vortoj kaj prefiksitaĝ ĝenerale, ekz., ne-grava, tra-esploro. 3. "senmezure dolorŝargito," formo jam iom tre ofte uzata, sed ĉu gramatike defendebla, krom per tio, ke la adverbo modifas la verbecon de la particeps substantivo? Kp. 13. "Falinto sub la akvon." "Lia vivo estis objekto (temo, motivo?) de tragedio de Goethe." 4. homa gento, (homaro). "noktonaskita problemo" (? germanismo). Sur pp. 11, 18/23, 16,5/6 troviĝas germana frazkonstruo, kiu estas neinternacia, kaj devigas multajn legantojn halti por analizi la frazon. 13/6 lukt' (boks?). Neologismoj: drast', ascend', sublim', eksplik', retrograd', progresiv', k.a.

Malgraŭ la iome fizikfakeca lingvaĝo la libreto tre povas alporti al multaj lernindajn konojn pri la efikado sur la homan organismon de tiu eterna potenco, kio finulas la homojn en la lastan dormon.

Tradukita bone de Bernard' Selzer elgermane.

Prezo unu ŝilingo ĉe 10, Ettenreichgasse 4/31, Wien, Aŭstrio.

(Robo).

Dr. Stamatiadis, president of the Greek Esp. Assoc., informed the general meeting of that body that Esperanto is

taught to over 1,500 pupils in the grammar schools of Athens and the Pireus.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Workso-p-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association.

Box 731F, P.O. Melb., by the Triumph Press, Surrey Hills, Vic.

Registered at G.P.O. Melbourne, for transmission by post as newspaper.